



*Esperanto
en Danio*

13-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2006



Vizitu standon 402!

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16, rete dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Jytte Sunekær

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40, rete: eed@esperanto.dk

Presado:

Kjeld Steffensen, Malmö

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58.
Rete ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.
Limdato por la venonta numero:
01.02.2007**

Enhavo

Lande

Kluboĵ mortas kaj naskiĝas.....	3
Ne forgesu viziti la Librofoiron!	
.....	4
Roma Thorsen (1919-2006).....	4
Tago de lingvoj en EU.....	5
Ne forgesu vian kontribuon al	
Fonduso Esperanto-Domo!.....	5
Gazeteltondaĵoj.....	6

Loke

Aalborg.....	7
Kopenhago.....	7
Næstved.....	9

Monde

Apogo al la esperanto-elsendoj	
de Pola Radio.....	10
Miaj impresoj pri IJK 2006 en	
Sarajevo.....	11
Retejo pri Ivo Lapenna.....	12
Semajno de homaj rajtoj kaj	
Esperanto.....	12
Spirituala Forumo kaj	
Esperanto.....	14
Venketo en EU.....	15
Sonas plu la tondra teksto.....	15
Anoncoj.....	19

Lande

Kluboĵ mortas kaj naskiĝas

Malfondo de Vejle/Fredericia

Post du ĝeneralaj kunsidoj la Klubo de Vejle/Fredericia decidis tre bedaŭrinde ĉesigi sian agadon nur du jarojn antaŭ la 100-jara jubileo de la dana Esperanto-movado. Sed ne estas la unua fojo ke tio okazas en tiu regiono, kaj ĉi-foje estas la klubo kiu fondiĝis en februaro 1995 kiam ĝi kunfandiĝis kun Vejle Esperanto-Klubo.

La historio de la du kluboj estas mallonge jena: la Klubo de Vejle fondiĝis en 1909 kaj aktivis ĝis 1912, kaj la dua periodo estis 1935-1995. La Klubo de Fredericia fondiĝis en 1934 kaj aktivis ĝis la kunfandiĝo kun Vejle en 1995. Tamen, ĝuste pro tiu historio ni tre esperas ke estontece denove fondiĝos nova klubo en tiu regiono kaj DEA apogos serioze reaktiviĝon de la movado en tiu parto de la lando.

Ni prenas la okazon elkore danki la estraron kaj la membrojn de la Klubo por la longedaŭra laboro kaj fidela apogo al nia movado kaj bonvenigas la membrojn de la Klubo kiuj daŭre subtenos la danan movadon per aliĝo kiel individuaj membroj de DEA.

Nova Klubo en Roskilde

La 21-an de oktobro fondiĝis klubo en Roskilde kies prezidanto estas Kurth Evald Jensen kaj kasisto Jytte hauschildt. La aktivecoj de la klubo estas precipe kurso de Esperanto en la Kulturdomo de Roskilde, sub la gvidado de Arne Casper. DEA elkore bonvenigas la novfonditan Klubon kaj deziras fruktodonan kaj sukcesan laboron!

Ileana Schrøder

Pliaj ŝanĝoj

Bedaŭrinde estis kelkaj eraroj en la Adresaro dissendita kun la pasinta numero de ĉi tiu revuo:

Grete Nielsen nun loĝas en
Bogensegade 37, 1-185
4700 Næstved.

Notu ke ŝi aperas dufoje en la Adresaro, sub Næstved kaj sub gazet-eltondaĵoj!

Jan Niemann, kontaktulo de DEFA, havas la retadreson

niemann@kabelmail.dk.

Søren Willemoes, kontaktulo por la blinduloj, havas la retadreson

s.willemoes@blindsigtmail.dk.

Ne forgesu viziti la Librofoiron!

Ankaŭ ĉi-jare DEA havos standon 402 en la unua etaĝo en Bogforum kie ni ekspozicios lernolibrojn, vortarojn, literaturon originalan kaj tradukitan, kaj kelkajn el la plej novaj eldonoj.

Unutaga bileto kostas 90 kronojn, por infanoj 4-12 jaraj 45 kronojn; dum la vendredo studentoj pagas nur 50 kronojn.

Aliĝu ankaŭ al la venonta jarkunveno de DEA, kiu okazos la 21.-22. de aprilo en Brogården, Strib ĉe Middelfart

Roma Thorsen (1919-2006)

Post plurjara malsano la instruistino, Roma Thorsen, forpasis la 18an de julio 2006 en Kopenhago. Ŝi estis edzino de la instruisto kaj la Esperanto-verkisto, Poul Thorsen (1916-2006). Ili ambaŭ lojale kaj diligente laboris por Esperanto kaj nacie kaj internacie, precipe en la lerneja medio. Ambaŭ akiris la rajton eksperimente instrui Esperanton en kelkaj klasoj de iliaj lernejoj.

Kune kun la mezgrada instruistino kaj redaktoro de la revuo "Esperanto", s-ino Kirsten Zaĉo, Poul Thorsen fondis en 1954 – sub aŭspicio de Komuna Konversacia Klubo, poste Kleriga Konversacia Klubo – la eldonejon "KOKO", kies sidejo estis Randbølvej 4, Kopenhago, la hejmo de la gvidanto, Kirsten Zaĉo. En la sama jaro aperis la unua libro de la eldonejo, "Rozoj kaj Urtikoj" de Poul Thorsen. En 1958 "KOKO" lanĉis la literaturan premion, "La Arĝenta Sprono". La unua gajninto estis la konata verkistino en la angla lingvo kaj en Esperanto, D-rino Marjorie Boulton.

Roma Thorsen ĉiam lojale subtenis sian edzon kaj kune kun li starigis ĉe UEA la kason "Biblioteka Apogo".

Birthe Lapenna

Tago de lingvoj en EU

Jen mia sperto pri la tago en Kopenhago:

La dana organizo Komunikado- kaj lingvaforumo aranĝis la 26-an de septembro seminarion pri komunikado kaj lingvoj, kadre de tutmondiĝo kaj interkultura komunikado.

Por mi estis precipe tre interese aŭskulti la kontribuon de Claus Haugaard Sørensen (dano), la ĝenerala direktoro de la Ĝenerala Direkcio por Komunikado de la Eŭropa Komisiono, kiu parolis pri la nova komunikadstrategio kaj vizio de komunikado en EU, pri sukcesoj kaj malsukcesoj de komunikado al la loĝantaro de EU fare de la Komisiono, kaj liaj personaj spertoj en tiu kampo.

Post la prelego mi turnis min al li kaj donis al li la novan DVD “Esperanto Elektronike”, informante lin ke ĉiuj EU-parlamentanoj ricevos ekzempleron. Mi pardonpetis ke la kovrilo estas en Esperanto, sed li respondis: ne gravas, mi komprenas! Mi demandis ĉu li scias pri niaj klopodoj enkonduki Esperanto en EU, kaj li respondis: jes, kaj vi ne bezonas varbi min, ĉar mi estas pozitiva tiurilate!

Ileana Schrøder

Ne forgesu vian kontribuon al Fonduso Esperanto-Domo!

Sendu antaŭ la fino de la jaro minimume 50 kronojn al Den Danske Bank, Fonden for Esperanto-Domo, konto 4230-818843 aŭ rekte al la kasisto Arne Casper!

Gazeteltondaĵoj

Aprilo:

Radioprogramo de Radio Vaticana pri esperanto-elsendoj.
Krucvortenigmo en *Kristeligt Dagblad* kun la vorto Esperanto.

Julio/aŭgusto:

La revuo *Munkiana* (periodaĵo pri la heredaĵo de Kaj Munk) publikigis du liajn himnojn en traduko de Hans Amund Rosbach (Du ved nok, mit hjerte *kaj* Mester med den tunge tornekrone).

Septembro:

Berlingske Tidende AOK mencias la lingvofestivalon 23.09.
Information – la samon.

Nordjyske Stiftstidende 'En ægte læsehest' pri inaŭguro de asocia registro, kiu inkludas la Esperanto-klubon de Aalborg. La inaŭgura parolado tradukita en esperanton.

Universitetsavisen pri la lingvofestivalo.

Oktobro:

Lumbildprelego en la E-unuiĝo de Næstved de Arne Juel Ottosen 'Amazonjunglen og Equador' menciita en *Berlingske Tidende*, AOK kaj duloke en Næstved-gazetoj. Same la regiona radio DR menciis, eĉ kun intervjuo de la prelegonto.

Politiken, I BYEN: La instruanto de la filmo Babel diras: 'Film er så tæt på esperanto, som man kan komme'.

Novembro:

Samvirke: Matematiko estas la Esperanto de la natursciencoj.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn al la kolektanto Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved (notu la novan adreson!).

Loke

Aalborg

La 27-an de septembro okazis aranĝo en la ĉefa biblioteko de Aalborg kie la prezidanto Ejnar Hjort prezentis Esperanton kaj la asocion. Estis la biblioteko mem kiu deziris prezenti kelkajn el la pli ol cent asocioj de Aalborg. Tial ili invitis dekon da asocioj la 27-an je la 16 horo por aŭdi kion la asocioj povas oferti al la publiko.

Esperanto estis prezentita tiamaniere ke Ejnar Hjort tradukis la bonvenan paroladon de la urba konsilisto al esperanto. Ĉeestis 5 aliaj membroj de la klubo, interalie la prezidanto de DEJO Rasmus Høyrup Jensen, kaj ili disdonis flugfoliojn kaj Esperanto-Nyt kaj informis la ĉeestantojn. Entute bona kaj sukcesa aranĝo.

Kopenhago

Kunvenoj okazas pli-malpli regule en tri diversaj lokoj, nome en KEK/DEFA, Esperantoskolen kaj La Kultura Esperanto-grupo.

KEK/DEFA kunvenas en Kalvebod Brygge 32. Aŭtomobiloj uzu la deklivon, piedirantoj uzu ŝtuparon, 'Trappetårn 32'.

Kursoj kaj legogrupoj: Ĉiulunde ekde 18.45, programo 19.30-20.15 + 20.45-21.30. Paŭzo kun ebleco aĉeti kafon/teon kaj bieron/akvon 20.15-20.45. Taso da kafo aŭ teo kostas po 4 kr, ½ pano kun fromaĝo po 4 kr, botelo da biero 8 kr, sodakvo (0,5 l) po 10,50. Aliaj refreŝaĵoj ne ekzistas kaj ne estas permesate mem kunporti!

KEK krome havas kurson ĉiujŝaŭde (escepte de lernejoj ferioj) ekde 18.45 en Den Classenske Legatskole, Vester Voldgade 98, ĉambroj 17 + 18, 2a etaĝo. Tie ne eblas aĉeti refreŝaĵojn.

Programoj en Kalvebod Brygge 32:

- Lu 20.11 La sesa kaj lasta prelego en la serio: Jens prelegos pri La origino de la lingvo. (la kvina okazis en Danasvej)
- Lu 04.12 Numerludo
- Lu 11.12 Jul-aranĝo
- Lu 15/1 Programo ankoraŭ ne fiksita
- Lu 29/1 KAEST-aranĝo – apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko. 5 danoj partoprenis novembre 2006
- Lu 5/2 KEK ĝeneralkunveno
- Lu 19/2 DEFA Kopenhago membrokunveno
- Lu 5/3 LA NEVIDEBLA MIRINDAĴO. Ĉu vi povas imagi la mondon sen elektro? Malgraŭ tio, ke elektro estas nevidebla, Bent Jensenius montros multegajn bildojn el la historio de elektro kaj rakontos pri ĝi.
- Lu 19/3 Informoj pri UK – printempaj kantoj.

Esperanto-skolen, Ny Kongensgade 21, 1a etaĝo: kunvenas unu sabaton monate, ordinaro la duan, je h 15.00. Refreŝaĵoj aĉeteblas.

- Sa 9/12 Julfesto por ĉiuj, - ankaŭ por ne esperantistoj, - ankaŭ por infanoj
- Sa 13/1 De la 10-a horo ĝis la 18-a: Peter Weide faros lingvajn ekzercojn kun ni. Kotizo por partoprenanto: 100 kr. Aliĝo necesas ĉe Kim Henriksen, hallandsgade 6,4., 2300 København S.
Telefono 3254 9354, retadreso kek@esperanto.dk.

La Kultura Esperanto-Grupo kunvenas en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, salono n-ro 1, 2a etaĝo, ekde la 19.00-a horo. Okazos tie Zamenhofvespero la 16-an de decembro; por aliĝi, turnu vin al Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 2720 Vanløse.
Telefono 3874 9764, retadreso kulturgrupo@webspeed.dk

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de eho-esperanto@stofanet.dk

Okazos

Ve 24.11. je h 14.00: Kunveno kun trakto de ĉapitro 13 de la libro *Faktoj kaj Fantazioj*.

Ve 08.12. je h 14.00: Kristnaskaranĝo kun ludo, bongustaĵoj kaj ujutno.

Post tio: Julferio ĝis

Ve 05.01. je h 14.00: Kunveno kun trakto de ĉapitro 14 de *Faktoj kaj Fantazioj*.

Ve 12.01. je h 19.30: Danlingva prelego (ankoraŭ ne estas fintraktitaj temo kaj preleganto).

Ve 26.01. je h 14.00: Kunveno kun trakto de ĉapitro 15 de *Faktoj kaj Fantazioj*.

Ve 02.02. je h 19.30: Danlingva prelego (ne fintraktita).

Ve 09.02. je h 14.00: Kunveno kun trakto de ĉapitro 16 de *Faktoj kaj Fantazioj*.

(*Programŝanĝoj – ankaŭ rilate datojn – povas okazi. Bv kontakti la sekretarion*)

Okazis

15.09, 29.09, 13.10, 27.10: Ni traktis diversajn ĉapitrojn de la libro *Faktoj kaj Fantazioj* laŭ antaŭe fiksita plano, sed kompreneble pluraj aliaj temoj montriĝis kaj estis traktitaj.

06.10: Arne Juel Ottosen prelegis en la dana lingvo antaŭ publiko, kiu konsistis krome el pluraj personoj ekster nia rondo. La temo estis Ekvadoro kaj ties ĝangalo. Kvankam la tekniko malhelpis la perfektan, la spektantoj travivis interesan kaj enhavoriĉan vesperon. La aranĝon menciis la lokaj komunikiloj, eĉ la loka radio intervjuis la prelegonton.

eho

Apogo al la esperanto-elsendoj de Pola Radio

Post la disvastigo de la informoj pri ebla ĉesigo de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio, jam multaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj skribis al la Pola Radio aŭ al la ambasado de Pollando en sia lando por apogi la daŭrigon de la elsendoj. Nome de UEA prezidanto Renato Corsetti pledis ĉe la pola ministro pri eksterlandaj aferoj, s-ino Anna Fotyga, kaj ĉe la Prezidanto de Pola Radio, s-ro Krzysztof Czabanski, por certigi la estontecon de la elsendoj.

En sia letero prezidanto Corsetti referencis al la ligoj inter Esperanto kaj Pollando, kaj emfazis la valoron de la Esperanto-elsendoj el diversaj vidpunktoj: “La Esperanto-elsendoj portis al Pollando multe da novaj, fidelaj amikoj, kiuj pozitive influas al publika opinio pri Pollando en sia vivmedio.”

UEA instigas esperantistojn kaj iliajn organizaĵojn multnombre skribi la la Pola Radio, kaj nacilingve, al la reprezentetoj de Pollando por apogi, ke Pola Radio daŭre elsendu en Esperanto. Retmesaĝojn al la Pola Radio oni povas sendi al esperanto@polskieradio.pl. La strata adreso por paperaj leteroj estas: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, A1. Niepodleglosci 77/85, PL-00-977 Warszawa, Pollando. Adreso de la pola ambasado en Danio estas: Richelieus Allé 12, 2900 Hellerup.

DEA skribis leteron al la pola ambasadoro, kaj ni ankaŭ scias ke ĝi estis tuj sendita al la Pola Radio.

Ileana Schrøder

Miaj impresoj pri IJK 2006 en Sarajevo

De la 6a ĝis la 13a de aŭgusto kunvenis ĉirkaŭ 300 junaj homoj el pli ol 40 landoj por ĝui la etoson de la Internacia Junulara Kongreso, interalie sep festemaj kaj ĝojaj danoj.

Ĉi-jare la renkontiĝo okazis en Sarajevo, la ĉefurbo de Bosnio-Hercegovino. Ĝi troviĝas en la sudorienta parto de la lando kaj estas ĉirkaŭata de bela montara pejzaĝo, kiu bonege proponas sin por ekskursoj.

La moto de la kunveno ĉi-foje estis "Multkultureco kaj Tutmondiĝo". La programo estis ofertriĉa; eblis partopreni lingvo- aŭ dankursojn, lerni Esperanton aŭ trejniĝi pri la Esperanto movado. Multaj ŝatis la homlupo-ludon, aliaj pli la UNU-ludon. Ĉiuvespere okazis muzika programo. Dolĉamar kaj JoMo ludis por junuloj, kiuj fajfis kaj aplaudis pro ĝojo.

Kompletigante la renkontiĝon, la partoprenantoj organizis la tradician, buntan internacian vesperon. Ni spertis teatraĵon, skeĉojn kaj la faman kanton "Mola" kaj poemon de Samir Beĉić.

Malgraŭ kelkaj tagoj kun pluvoverŝoj ni havis bonegan tempon en Sarajevo kaj forveturante multaj jam antaŭĝojis pri la venontjaraj kunvenoj.

Dennis Priskorn



Junularo en Sarajevo

Retejo pri Ivo Lapenna

Ivo Lapenna estas unu el la plej elstaraj figuroj en la historio de Esperanto. Li estas la ”konstruinto de moderna UEA”, ni povas danki al li la historian venkon ĉe UNESKO en Montevideo, kaj multajn aliajn aferojn. (Estas ne senkaŭze, ke en la oficejo de Eventoj pendas 2 fotoj: tiu de Zamenhof kaj tiu de Lapenna...)



Memore al lia agado ekzistas pluraj instancoj:

- Fondaĵo Ivo Lapenna
- Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna
- Stipendio Ivo Lapenna, ktp.

Oni povas legi pri ili pli detale en la nun konstruata, nova retejo:

<http://www.ivolapenna.org>.

Prizorgita de Bruno Masala, ĝi ankaŭ enhavas grandajn partojn de liaj verkoj en pdf-formato.

[laŭ Ret-Info]

Semajno de homaj rajtoj kaj Esperanto

La semajno 9-16 de decembro estas la Internacia Semajno de Homaj Rajtoj. Estus bona ideo diskuti tiun temon en unu el la venontaj klubaranĝoj.

(Ileana Schrøder)

“Homaj Rajtoj” riskas iĝi tro banala esprimo, ĉar ĝi estas re-dirata tagon post tago, horon post horo de ĉiuj inform-kanaloj de la mondo.

Ĉiukaze estas unu aspekto de homaj rajtoj, pri kiu oni apenaŭ parolas. Temas pri la lingvaj homaj rajtoj. Jes, kelkaj izoluloj, neesperantistaj kiel ankaŭ espe-

rantistaj, parolas pri tio. Ili asertas ke tio, kio estas skribata en la artikolo 2-a de la deklario, efektive devas validi, ankaŭ rilate lingvon.

Fakte en la retejo de la Supera Komisiito de UN pri homaj Rajtoj (<http://www.unhchr.ch/udhr/lang/115.htm>) oni povas legi ankaŭ en Esperanto, ke “ĉiuj rajtoj kaj liber-

ecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.”

La rajto ne esti diskriminaciata surbaze de lingvo, do, estas klare menciata tie.

Kaj ĉu ni, kiel esperantistoj, ne ekestis ĝuste, por ke tiuj rajtoj estu respektataj ĉie, kaj, bonvolu atenti, je ĉiuj niveloj? Laŭ mi oni ne rajtas defendi la lingvon de la enmigrinta grupo, kaj ne samtempe tiun de la tradicia malplimulta nacio vivanta en la lando de longa tempo. Oni ne rajtas defendi la lingvajn rajtojn de la malplimulta nacio kaj ne samtempe defendi la lingvajn rajtojn de la tuta lando antaŭ pli fortaj internaciaj lingvoj. Se ni volas fari du ekzemplojn, ni diru, ke oni ne rajtas batali nur por protekti la oficialajn lingvojn de Eŭropa Unio kontraŭ la evidenta danĝero, ke la angla forviŝos ilin, kaj ne samtempe batali por la lingvaj rajtoj de la bretonoj en Francujo kaj de la turkoj en Eŭropo. La samo validas rilate al Ĉinujo pri la rajtoj de la ĉina, esti unu el la efektive uzataj lingvoj en UN, sed sam-

tempe pri la neceso protekti la naciajn malplimultojn enlande.

Nur esperantistoj povas kompreni la miopecon de multaj landaj aŭ lokaj grupoj, kiuj opinias, ke ili povos savi sin ankaŭ se la aliaj pereos, eble ĉar ni ĝuste naskiĝis por defendi la lingvajn homajn rajtojn je ĉiuj niveloj. Fakte Zamenhof, la konata revoluciulo, diris: “Ni montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiliĝu aŭ englutu alian.” Kaj li ankaŭ parolis pri la maljusteco kaj malprudenteco de la naciismo de grandaj kaj malgrandaj nacioj.

Surbaze de ĉi tiuj ideoj la estraro de UEA alvokas vin festi la Zamenhof-tagon en la kadro de la “Semajno de Homaj Rajtoj kaj de Esperanto”, de la 9-a ĝis la 16-a de decembro 2006. Jam pasintjare ni diskutis pri tio, ke jam pluraj esperantistoj havis la ideon vastigi la signifon de tiu tago al “Tago de Esperanto” kaj doni al ĝi ankaŭ informan elementon per aranĝado de eventoj kune kun aŭ por neesperantistoj.

Tiu semajno inkluzivas la 10-an de decembro, la ĉiu-jaran datrevenon de la Deklaracio de homaj

Rajtoj, kaj la 15-an, kiu estas la Zamenhof-tago.

Do, la Semajno nun lanĉata ebligas agadon al la ekstero pri la lingvaj homaj rajtoj. Ekzemple, kolektu informojn de nerespekto de lingvaj rajtoj en via loĝloko kaj sendu la pruvon pri tio al UEA, kiu siavice atentigos la Oficejon de la Supera Komisiito pri Homaj Rajtoj de UN. Estas tempo transiri de teoriumado inter ni al agado praktika pri la lingvaj homaj rajtoj. Vi povus aranĝi kunvenon pri tio kun neesperantistaj asocioj aŭ lingvistoj aŭ instruistoj, ktp. kaj klarigi al ili kial Esperanto estas parto de la tutmonda batalo por la homaj rajtoj.

Samtempe oni povas ankaŭ zorgi pri la tradicia pli interna agado (festo de la libro en Esperanto, kluba kunveno por memori Zamenhof).

Tre bonan agadon eksteran komencis jam de kelkaj monatoj grupeto da aktivuloj, kiu okupiĝas pri la Esperanto-tago de verkantoj de retaj tag-libroj, blogoj, kaj ili jam atingas sukcesojn. Vidu en <http://esperanto-usa.org/esperanto-tago/>. Multaj aliaj grupoj jam pretigas siajn tradiciajn agadojn.

Ni igu ĉi tiun semajnon ilo por atentigi la mondon pri lingvaj homaj rajtoj kaj pri la solvo de ili pere de Esperanto kaj samtempe por festi nian esperantistecon.

Renato Corsetti

Spirituala Forumo kaj Esperanto

De la 6-a ĝis la 10 de decembro okazos en la ĉefurbo de Brazilo, Brazilio, la unua Monda Spirituala Forumo. Ĝi aldonos pli ampleksan perspektivon al la Monda Ekonomia Forumo kaj la Monda Socia Forumo. Kadre de novaj paradigmoj por solvi la mondan komunikad-problemon, la Forumo pridiskutos interalie, la temon "Kultura kaj Lingva Diverseco" kaj proponos Esperanton kiel egalrajtan komunikilon.

Pliaj informoj legeblas ĉe: www.forumespiritualmundial.org.br

Venketo en EU

Esperanto estas unu el la lingvoj uzataj por la komunikoj de Europa Unio sub nuna prezidado de Finnlando. La informservo de la finna registaro atentigis pri tio la 28an de aŭgusto 2006 en siaj informoj en la franca kaj angla, same kiel la nederlanda inform-agentejo ANP. Ankaŭ la senpaga nederlanda gazeto “Spits” (31an de aŭgusto 2006) publikigis artikolon pri tiu novaĵo sub la titolo “EU retroŝtas latine kaj Esperante”. Temas nur pri la semajnaj bultenoj, kiuj aldoniĝas al la informoj dissenditaj precipe en la angla kaj franca, kaj, malplimulte, en aliaj lingvoj inter kiuj la latina.

“Mi tute aprobas tiun simbolan uzon de la latina fare de la EU-a prezid-lando, por memorigi al ni europanoj nian komunan historion kaj kulturan heredaĵon. Tamen, ni konsideru ankaŭ la nunon kaj la venontecon, kaj estas vero, ke multe pli da personoj en Europo parolas kaj uzas Esperanton ol Latinon”, diris la brita esperantisto Tim Morley, al kiu venis la ideo ke la oficiala novaĵ-bulteno devus aperi ankaŭ en Esperanto.

Do, Tim Morley rapide starigis teamon de diverslandaj esperantistaj tradukistoj kaj rilatis kun la direktoro de la oficiala ttt-ejo de la finna registaro por peti ĉu eblus publikigi Esperantan version de la bulteno. La direktoro tuj donis sian permeson. La unuaj bultenoj en la latina estis tuj esperantigitaj kaj enretigitaj ĉe <http://conspectus.wordpress.com/>.

Sonas plu la tondra teksto

Mi ne pretendas ploron ĉe mia povra ĉerko...

la mondo min forgesu, kaj lasu min malvarma.

— tiel versis iam la homo juna kies mortnovaĵo disatingis nian komunumon ekde la 11a de septembro, dato de nun misaŭgura ankaŭ por ni, esperantistoj. Falis turo — falis la turo olda, turo impona, sed ne ebura. Forvelkis voĉo ne velura, dure pura. Forglitis plumo sen

miso kaj kompromiso. La silento de kelkaj lastaj jaroj fariĝis definitiva.

Ĉe la ĉerko ni ne ploras. Ne ĉar ĉeestas pastro kiu *fablojn knedas / pri dio, kristo, sankta petro*, sed ĉar ni ne forgesas. Nin William Auld, la prafilo de Ruben, nia verstajlor-prapatro, ne lasas malvarma. Ni staras orfaj, sed kun heredaĵo riĉa, kiu ne la manojn plenigas. *Ne mortas kiu por hom-miriadoj / el sia vivtrezor' faris regalon: / skuinte for ĉi-teran la penadon, / li portas plu vivigan idealon.*

La lasta cito venas de János Arany — iom-tiom la hungara Auld, same verkinto epopea kaj tradukinto de Ŝekspiro. (Johano la Ora, Vilhelmo Olda...) Infanaĝe mi kur-ludis ĉirkaŭ statuaj piedoj de Arany. Student-aĝe mi ĉirkaŭbrakis piedojn ĉe Auld, ĉu tiujn



klasikajn de *tavernistino siria*, ĉu *gambon filigranan* de Anna... kaj *lascive eksopiris* traduki hungaren *La Infanan Rason*. Traduki, *jes, eĉ multaj tion faris*: Danvy en la francan, Verloren nederlanden, Knoedt al la portugala... jen, certe miaflanke, *surogata kreo*, monaka omaĝo de kiu kolektas *vortojn pige; komentariaĉo al tondra teksto*.

Dum ni surogatis, William Auld kreis, kreadis. Ne nur literaturon, sed pli: komunumon, en multaj manieroj rektaj kaj malrektaj. Multas la atestoj pri lia helpemo, societemo, instruivo, senmoŝteca aŭtoritato. Rekte, mi havis bonŝancon sperti lin nur unu fojon, en Roterdama vespero, kiu kun viskio rapide fariĝis nokto... Malrekte, mi memoras svisan semajnon en kultura centro, kie entuziasma grupeto, en verdfamilia varmo, klopodis komprenige dissekci *La Infanan Rason*, helpe ankaŭ de ĉiaj komentoj kiujn Auld mem afablis sendi... kaj mi memoras slovakian renkontiĝon de homoj tradukintaj la aŭldan verkegon ĉiu al sia lingvo... pluraj el ni, pri “Unu el ni”.

*En iu kamp' soleca mi estu nova sterko:
el mia koro kresku salik' simbole larma.*

Ne estas soleca lia kampo — kiun li prisemis, plugis, sterkis... plu ĝisverkis. Dekoj kunkultivis kun li tiun agron, sed dekmiloj profitis el la rikolto, paŝante *al plena posedo*. Eĉ lia morto kunvenigis nin en kampo de sentkomuneco, dum larmis simbole interretaj paĝoj, kun kondolencoj de legantoj el Ĉilio kaj Ĉinio, Bharato kaj Irano... «se ni akceptu ke Auld haltis, nur povas temi pri “halto en alto”» — omaĝis teheranano. Mem Auld iam diris, ne kun orgojlo, sed kun malbedaŭro pri sia decido verki ne angle: “miaj libroj estas legataj tra la tuta mondo”...

La tuta mondo: jen kio esencas. Grandulo en la infanrase sinsekva vico Zamenhof-Kalocsay-Miĥalski-Lapenna, la postveninta (“genio post mi venonta”) Auld kreis ne nur la legaĵon, sed same la tutmondecon. Ankaŭ la Majstro aŭ Baĝy jam estis legataj en klubanguloj ĉie, sed Auld atingis pli vasten: li parte trafis, parte kunkreis la epokon en kiu la ĉie-eco de nia komunumo estas pli ol pia deziro, ja evidentajo. Panegirante al Lapenna, revivigante Zamenhofon, verkante porokazajn salutojn aŭ jubilean poemon, li rolis kvazaŭ nacia poeto de nia preternacia komunumo. Per *La Infana Raso* li iĝis, transe, tuthomara.

William Auld malfermis la horizonton de eŭropa nuno al mondskala ĉiamo, kaj fuelis ĉe legantoj skeptikan entuziasmon tiom konvenan al la duvizaĝa naturo de esperantismo mem, disŝirata inter alta idealo kaj sekulara nesukceso. La *perfidita junco* de Auld ne povis triumfe transpaŝi la murdinstruan mondbuĉadon sen konscii ke la *batalo* estis por *kapitalo*... Per ĉiama dozo jen da socia kritiko, jen da amaro, ironio aŭ humuro, li kreis vastgaman verkaron, kvazaŭ neprus ke li unupersona traarku beletran breĉon jarcentan, anhele-dormbedaŭre nuligu nian kulturan malfruon, prenu modernisman elanon por piloti nin al altoj kie ne plu gravas estetikaj etiketoj kaj etikedo. Kaj *preter tio, preter tio*... laŭbezone, li surmetis la togon de akademiano, la talaron de ĵuriano, la kompletan de estrarano... prenis kraigonon de korektisto, kreton de instruisto, tajpilon de

redaktoro, notaron de kantemulo... Tantalaj bezonoj kreis Protean plenumanton.

En la neekzistantaj liceoj de Esperantujo, kie Auld estas pli ol vicedestro, diligentaj adoleskuloj studas kaj studos *La Infanan Rason...* sed ankaŭ intersendos amajn kaŝleterojn kun aŭldaj vortoj, ebriiĝos kun Vilĉjo *kamarade kaj komplice*, kaj eĉ trovos furaĝon por siaaĝa ribelo en liaj teme aŭdacaj *lascivotajdoj* kaj liaj poezi-pintaj *Provizore, Akcepto strangas kaj Noktaj pensoj...*

Tiuj liceanoj estas ni. En niaj studoj ni alvenas la finofaran strofon:

*Kiam mi kuŝos tombe, mi plu ne devos senti,
nek pensi, nek esperi, nek esti turmentata;
ne devos mi pajaci, nek vortojn, farojn penti,
sed putros sendolore en mort' agrable glata.*

Ne estas inter ni nun alia homo de liaj staturo kaj portkapablo.

Estu, William Auld, al vi la mort' agrable glata: ĝi eble longe daŭros, sed dume Vi estos ĉiam legata.

István Ertl [Ondo de Esperanto]

Notoj

1. Tago de la (minuskle!!!) pinoĉeta puĉo, en 1973, kontraŭ prezidento Allende — sed amiko Daŝgupto atentigas ke “la 11a de septembro estas ankaŭ la tago en kiu mahatma gandhi lanĉis la satjagrahon”, la principon de senperforta rezisto. Kaj tiutage hungaroj malfermis sian feran kurtenon en 1989.

2. La sepulton de Auld enkadrigis religia ceremonio. Ĝia ĉefa lingvo estis, paradokse sed evidente, la angla.

3. *Mi ne pretendas ploron*, el la ciklo *Spiro de l' pasio*.

Anoncoj

RevuServo de DEA

Denove la nova jaro alproksimiĝas, kaj nun estas tempo mendi revuojn. Se vi deziras aboni, skribu aŭ telefonu por ĝirilo – sed bonvolu memori, ke la limdato por enpago estos

la 10-a de decembro 2006

Kontaktu min telefone 3920 6348 aŭ 2140 8487.

Rete: arnecasper@dbmail.dk.

Pagonte, bonvolu uzi la kodo(j)n:

Kodo	Nomo	Abonprezo
Esp	Revuo Esperanto	270.- DKK
OdE	Ondo de Esperanto	245.- DKK
LE	La Espero	170.- DKK
NV	Naturista Vivo	110.- DKK
LJ	La Jaro	40.- DKK
JA	Juna Amiko	110.- DKK
LKK	La Kancerkliniko	170.- DKK
LS	Litova Stelo	105.- DKK
Kom	Komencanto	135.- DKK
Mon	Monato	345.- DKK
FE	Femina	165.- DKK
hdE	heroldo de Esperanto	270.- DKK
LF	Literatura Foiro	250.- DKK



Eŭropa Esperanto-Unio invitas la esperantistojn al la 7-a Kongreso kiu okazos en Maribor, en unu el la novaj kaj tre belaj EU-landoj, Slovenio. La kongreso enhavas multajn interesajn aranĝojn, kiel oni povas vidi en la retejo www.esperanto-maribor.si

Por plifaciligi la aliĝon, oni povas sendi la kotizon kaj aliĝilon al nia UEA ĉefdelegito Arne Casper. Bonvolu kontakti lin por havigi pli da informoj tiurilate, tel. 39 20 63 48/ 21 40 84 87.

